

Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Orgaan van de VLAAMSE ESPERANTISTENBOND, POSTBUS 100, MECHELEN

Postrekening 2321.50 van V. E. B. Raapstr. 74, Gent

Verschiĝnt maandelĝks
Een en twintigste jaarg.
Nummer 10 (242)
OCT. 1954

Vertegenwoordiger in Nederland:
L E E N
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P. M. Mabesoone
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

LIDGELDEN:
* Leden: 100 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:
België: 75 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

LA INFORMA LABORO PRI ESPERANTO PER LA GAZETARO

Diversaj landaj societoj de nia movado starigis informservojn por la gazetaro, kaj ankaŭ nia centro, la Universala Esperanto Asocio subtenas tiun laboron per la disponigo de taŭga materialo. Prizorgis tiun taskon ĝis la lasta jaro s-ro Einar Adamson (Göteborg, Svedujo), kiam ĝin nun transprenis d-ro Ivo Lapenna (Londono), por kiu tio estas fako de lia ĝenerala laboro pri Informado kaj Dokumentado. La plej ampleksa tia servo estas tiu de la itala Esperanto-Federacio, kiu eldonas en Torino monate en amplekso de kvin folioj „Notiziario Internazionale”. La svisa servo aĝas pli modeste: kutime unu folio kaj nur dumonate kun la titolo „Esperanto-Information”. Se oni konsideras, ke la svisa servo aperas en du lingvoj, nome germana kaj franca, kun enhavo kiu ne estas tute identa, ĉar ni havas unu apartan redaktoron por alemana Svislando kaj unu por romanda Svislando, ni do ankaŭ eldonas dekdu apartajn gazetservojn en la jaro. Simile kiel la svisa laboras ankaŭ la belga gazetservo.

Nu, mi ne povas karakterizi ĉiujn gazetservojn, sed principe ili laboras laŭ la sama principo: ili prezentas mallongajn novaĵojn pri eventoj sur la Esperantista kampo. Unu grava diferenco tamen ekzistas, en kelkaj landoj oni dissendas regule bultenon kun certa amplekso, kiu enhavas plurajn novaĵojn, en aliaj oni dissendas bultenojn neregule kun eble nur unu aŭ du novaĵoj kiel eble plej freŝaj laŭ tio ke oni havas ion interesan por komuniki; alie oni silentas. Ambaŭ sistemoj havas avantaĝojn kaj malavantaĝojn.

La eldono de gazetservo kaŭzas konsiderindan laboron, sed ne tre altajn kostojn. Oni nur bezonas paperon kaj afrankon, kaj tiu elspezo certe ne devus ĝeni societojn, kiu ne volas tute neglekti la propagandon. La laboro konsistas en la kolektado kaj redaktado de la materialo. Kiel fontoj servas la Esperantista gazetaro kaj la jam cititaj bultenoj de la Centro de Informado

kaj Esploro.

Elektante la plej taŭgajn informojn oni konstante devas pensi: kio povus interesi mezan gazetleganton de la lando, en kiu oni vivas. Novaĵo, por ni Esperantistoj ja gravega, ekzemple ŝanĝo en la estraro de UEA, estas tute senvalora por nacia gazetservo. Alia novaĵo, kiu ne vekas grandan eĥon, estas la malfermo de kurso aŭ la okazigo de prelegoj en iu loko escepte de la urbo, kie la gazeto mem aperas; escepto estas ankaŭ la okazigo de la koordinataj kursoj en multaj landoj, ĉar tio estas interesa internacia manifestacio.

Gravaj estas ĉiuj novaĵoj, kiuj koncernas la sintenon de iu registaro (eĉ nura urbestro) al Esperanto, ĉar tio jam tuŝas la politikon, ja la ĉefan nutraĵon de la gazetoj. Plej taŭgaj por gazetservo estas novaĵoj, kiuj havas iun personan eĥon, ekz. mondvojaĝo per E., geedziĝo per E., Tito-intervjuo pri E., retrovo de perdita parenco dank' al E. k.s. Frappe pravas tiun aserton la grandega nombro da artikoloj, kiuj aperis ĝis nun pri la vojaĝo de la germana knabino Sinjo tra pluraj eŭropaj landoj. Tre valoraj estas ĉiuj novaĵoj, kiuj montras la vivkapablon de Esperanto, do la grandaj kongresoj, feriokursoj, gravaj libroj (Neergaard-libro, tradukoj de klasikuloj), ĉar ili pravas al la redaktoroj, eĉ se ili ne publikigis ilin, la gravecon de nia afero. Kaj pri tio ni ĉiam devas reinsisti.

Tre atentinda punkto en la elektado de la novaĵoj sciigendaj al la vasta publiko estas la fidindeco. Mi observis, ke tiu vidpunkto ne en ĉiuj gazetservoj estas sufiĉe konsiderata; sed tio gravas, ĉar, se oni unu fojon konstatis, ke iu informservo mensogas, fanfaronas aŭ troigas, oni neniam plu kredas ĝin. Oni ankaŭ ne timu iam publikigi iun novaĵon, malfavoran por Esperanto. Ekz. se la parlamento de iu lando decidis ne-enkonduki Esperanton en la lernejojn, tio estas publikiginda ĉar ĝi pravas, ke oni serioze okupiĝis pri la inter-

nacia lingvo, ĝi pravas eble, ke preskaŭ plimulto (mi pensas pri Nederlando) subtenas Esperanton, kaj fine, la fakto, ke ni ne timas la diskonigon de tiu novaĵo, pravas al la redakcioj, ke ni sentas nin sufiĉe fortaj por toleri la veron kaj ke ni estas fidindaj personoj, kiujn oni ankaŭ kredu, kiam ili diskonigas favoraĵojn pri E.

Ni ankaŭ zorgu ne doni tendencan turnon al niaj novaĵoj. Raportante pri Esp.-ista mondvojaĝo, ni ne aldonu „jen kio pravas la grandan utilecon de E.”, la fakto parolas per si mem, kaj ĉiu aldonu ŝajnos propagando kaj reklamo. Oni ankaŭ ne uzu tro ofte la vorton Esperanto, sufiĉas se ĝi aperas unu fojon en unu depeŝo, poste oni povas utiligi la esprimon „Internacia Lingvo” aŭ simile (persone mi preferas tiun parolturnon al la antikviĝintaj vortoj „mondlingvo” aŭ „mondhelpingvo”).

La redaktado de la novaĵo estu farata en la normala gazetista stilo de la koncerna lando: oni kompreneble evitu pezan stilon kaj gramatikajn erarojn. Neniu povu diri pri ni, ke ni propagandas internacian lingvon kaj eĉ ne finlernis nian nacian! Pretiginte la novaĵojn oni devas multobligi ĝin kaj dissendi ĝin al kiel eble plej multaj naciaj ĵurnaloj; oni ankaŭ ne forgesu gravajn fakĵurnalojn, ekzemple la sindikatan kaj kooperativan gazetaron. En Svislando tri diversaj personoj prizorgas la redaktadon, la multobligadon kaj la dissendadon, tiel ke la laboro estas bone dividita. Ekzistas ankoraŭ kvara laboro, kiun ne unu persono sola povas fari; t.e. la observado de la gazetaro por konstati, ĉu io el la dissendita materialo aperas. Ekzistas gazet-eldondaj servoj, kiujn oni povas aboni, kaj kiuj sendas ĉiujn artikolojn ekz. pri Esperanto sed ili estas tre multekostaj kaj eĉ estas ne tre fidindaj. Pro tio ni rezignis pri tio en Svislando kaj esperas, ke niaj membroj estos sufiĉe bonvolaj kaj atentemaj por sendi al la informa servo ĉiujn gazet-eldondajojn.

La rezulto de nia laboro ĝis nun ne estis tre impona, sed ni ankaŭ ne atendis tion, ĉar nia gazetservo estas nova kaj ni devas pravi per longdaŭra regula aperado, ke ni estas fidinda kaj stabila entrepreno.

Krome oni devas scii, ke jam ekzistas en ĉiuj landoj multspecaj gazetservoj pri multaj temoj, kaj neniu gazeto havas tro malmulte da materialo, sed ĉiuj tro. Tamen ni jam povas diri, ke ĉiu novaĵo aperas minimume trifoje, kaj nur tio jam pravigis gazetservon. Sed la aperigo de niaj novaĵoj ne estas nia sola celo. La utileco konsistas ankaŭ en aliaj punktoj. Ni provas al la redakcioj, ke ni vivas kaj estas aktivaj, tio havas ekzemple la efikon, ke ili ricevante iun efemeran novaĵon pri nova mondlingvo, tuj konscias, ke tiu ne estas komparebla kun E. Krome ni havas la eblecon refuti tuj ĉion, kion ni konsideras refutinda per nia regula gazetservo, kio efikas tute alie, ol se ni skribus leteron al redakcio, kiu ĝis nun neniam sciis ion pri nia ekzisto. Aliflanke se subite aperas tre bona novaĵo pri Esperanto, ekzemple disvastigebla per iu nacia depeŝ-agentejo, la redaktoroj ankaŭ estas preparitaj kaj vidas tiun novaĵon sur la fono de niaj ĝistiamaj regulaj informoj.

Tio ankoraŭ ne estas ĉio. Oni povas utiligi gazetservon ankaŭ por informado de aŭtoritatoj. Se ĝi estas bele multobligata - ni havas tiun privilegion en Svislando - la gazetservo povas anstataŭi nacilingvan Esperantogazeton propagandecelan. En Svislando ni ankaŭ studas la eblecon enkonduki novan kategorion de membroj de SES, kiujn oni eble povus nomi „Amikoj de Esperanto”, al kiuj ni donos rekompence por ilia modesta kotizo nian regulan gazetservon. Tiamaniere ili ĉiam povos scii, kio okazas en Esperantujo, kaj samtempe ni ne prenos nur ilian monon sed ankaŭ donos ion al ili.

Ni parolis ĝis nun pri la gazetservoj enhavantaj mallongajn novaĵojn. Tio tamen ne estas ĉio, kio estas farebla sur la gazetara kampo. Tre gravan rolon ludas ankoraŭ la novaĵoj, kiujn la lokaj grupoj donas rekte al siaj lokaj gazetoj, informante ilin pri la grupo vivo. Tiuj lokaj novaĵoj estas gravaj ankaŭ rilate al la nacia gazetservo, ĉar ili pruvas al la redakcioj, ke ekzistas en la koncerna loko homoj, kiuj interesiĝas pri E. Pro tio ke gazetistoj ĉiam serĉas publikigi tion, kio interesas la publikon, ili poste volonte publikigos ankaŭ la novaĵojn de la nacia gazetservo. Aliflanke se en iu loko ne ekzistas Esperantistoj aŭ se ili neniam skribas al siaj redakcioj, la koncernaj redaktoroj devas kredi, ke en ilia loko neniu interesiĝas pri la internacia lingvo kaj do ili ankaŭ ne vidas motivon por publikigi ion. Ju pli granda estas tiu intereso, des pli longaj povas esti la artikoloj pri E., kiujn redakcioj pretas akcepti. Bone estas, se iu povas sendi originale verkitajn artikolojn al la gazetoj, sed oni ne preterlasu ankaŭ la eblecon publikigi de tempo al tempo pli longan, fundamentan artikolon pri E. en nacilingva gazetservo. Se la te-

POSTKONGRESO EN LEEUWARDEN

En Frisa land' ni rendevuos,
En verda sfer' ni tie ĝuos!

Tiu kongreso okazis de la 7-a ĝis la 11-a de aŭgusto kaj kunigis 170 partoprenantojn el 15 diversaj landoj; per tri grandaj aŭtobusoj 120 U.K.-anoj veturis al Leeuwarden, kiam aparte vojaĝis dana karavano.

Dimanĉe oni aŭtobusis al la ŝipoj por la kanaloj kaj lagoj de Mez-Frislando; posttagmeze promenado tra Grouw estis organizita. Dum la festvespero en Leeuwarden dancis frisa grupo, okazis prezentado de kolorfilmo pri Frislando, kantado kaj balo.

Lunde la urbo estis vizitata, la kongresanoj akceptataj kaj regalataj en la urbodomo: tie la urbestro, s-ro Dijkstra (skabeno pri Instruado), alparolis la ĉeestantojn en Esperanto kaj aparte babiladis kun preskaŭ ĉiu. Poste okazis la festa tagmanĝo, ĉe kiu deko da reprezentantoj de diversaj nacioj rakontis historieton aŭ memoraĵon el sia Esperantista vivo.

Marde oni tre frue forveturis aŭtobuse tra Franeker al Harlingen por enŝipiĝi al Vlieland: la duhora vojaĝo kaj malkvieta maro rezultigis... nu, la kompreneblajn sekvojn! Tio ne malhelpis interesan viziton al la Lumturo, komunan tagmanĝon kaj promenadon al la strando, tra duonoj kaj arbaretoj.

Kaj fine, merkrede, s-ro Kingsma eldiris la adiaŭajn vortojn, post kiuj s-ro D. Kennedy, esprimis ĉies dankon, precipe al li kaj f-ino Laverman, la ĉefaj organizantoj.

Cu ni substreku ke ĉiujn aranĝojn ĉeestis reprezentantoj de pluraj Leeuwardenaj ĵurnaloj, kiuj raportis abunde en gazetoj, eĉ per bildoj!

J.T.

reno estas bone preparita, ĝi ankaŭ havas ŝancon. Fine oni ankaŭ studu la demandon, ĉu la cirkonstancoj en iu lando ne igas pli rekomendinde, ke la nacia gazetservo ne estu dissendata de unu centro, sed ke lokaj reprezentantoj sendu ĝin al la gazetoj, kun kiuj ili jam havas kontakton. En nia afero personaj rilatoj ankaŭ estas ĉiam plej utilaj.

Malgraŭ la longeco de ĉi tiu artikolo, kiu ne estus modelo por gazetservo, la temo certe ne estas elĉerpita. La temo ĝis nun preskaŭ neniam estis prilaborita vere fundamente kaj science, dum vere ĝuste sur tiu kampo diletantismo povas fuŝi multe. Valoran materialon enhavas artikolo de d-ro Ivo Lapenna „Grava Pliboniĝo de Nia Informado” kiu aperis sur paĝoj 222—225 de la 1953a jarkolekto de „Esperanto”. Mi tre ŝatus, se mi povus legi ĉi tie aŭ en aliaj Esperantaj gazetoj la spertojn kaj ideojn de aliaj personoj, kiuj jam praktike laboris sur la informa kampo.

Arthur Baur.

Raporteto pri la 27-a Kongreso de S.A.T. en Nancio (Nancy)

En la lorena ĉefurbo Nancio, plena de historiaj monumentoj pri sia plej brila epoko, la 18-a jarcento, kunvenis 500 kongresanoj el 15 landoj (aliĝis 553 el 21 landoj).

Okaze de Interfratiga vespero (sabate) ni aŭdis plurajn artistojn, inter kiuj la montmartra esp.kanzonisto Flego. En la Solena Malfermo k-do Bannier, la prezidanto de SAT, skizis per mallonga paroladeto la rolon de nia asocio, ĝian lokon en la historia evoluo de la homa socio. Krom la landaj kaj sindikataj reprezentantaj salutis unu el la du ĉeestantaj vic-urbestroj; ankaŭ reprezentantoj de la Nancia Akademio kaj Universitato partoprenis la Solenon. Poste la kongresanoj estis akceptitaj ĉe la belega urbdomo de la ĉefurbestro mem.

En la unua laborkunsido k-do Bannier kaj Bartelmes komentis la raportojn, kiuj aperis en „Sennaciulo”. Oni aprobis ilin per tre granda plimulto da voĉoj post debato, en kiu leviĝis akraj kritikoj kaj eĉ akuzoj sekve de artikoloj de Lucien Laurat en ĉi-jaraj n-roj de „Sennaciulo”. La Kongreso decidis transdoni tiun plendon al la Konflikto-Komisiono, cele de enketo.

En la dua laborkunsido oni raportis pri la ceteraj instancoj de SAT. Debato disvolvigis precipe cirkaŭ la raportoj de la Literaturo Komitato kaj de la Koresponda Servo.

En la tria kunsido oni vaste diskutis pri Interŝanĝo de Prelegoj en monda skalo kaj pri eventuala publikigo de kongresaj prelegoj en multobligita formo. Venontjara kongres-urbo estos Linz en Aŭstrio (6—13 aŭgusto 1955).

La Gvidrezoluzio akceptita de la Kongreso spegulas la firman volon de la anaro persisti en la vojo ekirita, malgraŭ ĉiuj obstakloj eksteraj kaj internaj, helpate de la por-esperantaj laboristoj esperanto-asocioj, kiuj formas la novajn SAT-anojn.

La du ekskursoj, unu tuttaga al Vogejoj kaj Kolmaro, kaj duontaga al la Mozelvalo kaj Lunevilo, plensukcesis dank' al la bona organizado kaj la tre favora somera vetero.

Gazetarservo funkciis tiel sukcese, ke ĉiutage longaj raportoj ilustritaj aperis en la regiona gazetaro, — multe pli regule kaj amplekse ol en iu ĝisnuna kongreso de SAT.

La radio-stacio nancia dissendis propagandintervjuon, en kiu partoprenis la esperantistaj infanoj. La Organiza Komitato perfekte zorgis pri la aranĝoj kaj sekve povis registri la meritan rekompencan por siaj laboroj kaj klopodoj.

Tre optimistajn komentojn elvokis la ĉeesto de 25 esperanton-parolantaj infanoj el kvin landoj.

Vendrede adiaŭa vespero kun riĉa arta kaj amuza programo finis la kongreson.

UNU TAGO EN LA OFICEJO DE UEA

S-ro Cecil C. Goldsmith, la ĝenerala sekretario de Universala Esperanto-Asocio fariĝinte 65jara decidis demisii de sia posteno. Li dediĉis sian tutan vivon al Esperanta laboro kaj akiris al si grandajn meritojn. Trovinte artikoleon de s-ro Goldsmith persone en la aŭstralia gazeto La Rondo ni kun plezuro represas ĝin, ĉar ĝi donas impreson pri la laboro, kiun devas plenumi la Centra Oficejo en Heronsgate, kiun ĝis nun direktis s-ro Goldsmith.

„Ni komencu la tagon. Je la 8-a matene alvenas la poŝtisto, kaj hodiaŭ per la unua livero alvenis 49 leteroj. Kvin minutojn poste mi eniras la oficejon kaj komencas malfermi la leterojn. La nuraj malfermo kaj trarigardo de la leteroj okupas preskaŭ unu horon—kaj sekve, se alvenas 4-aŭ 6-paĝa letero mi flankenmetas ĝin por tralego en la vespero. Tio okazas sufiĉe ofte kaj do estas konsilinde ne skribi vivhistorion se oni vere bezonas diri nur ke oni ŝanĝis sian adreson! Jen alia afero kiu ĉiam ĝenas nin: eble kvinono de tiuj kiuj skribas al ni ne skribas siajn adresojn sur la leterpapero, sed nur sur la koverto. Ĉar ni kutime forjetas la kovertojn ni estas tre malkontentaj, kiam respondante ni devas elserĉi adreson en la registroj.

Post la leteroj sekvas la ordigo de la laboro por la aliaj oficistoj. Unu ricevas la laboron pri enskribo de kotizoj, novaj membroj, adresŝanĝoj (ni tre ŝatus ke nia Komitato enkonduku novan regulon kiu malpermesus adresŝanĝojn!), k.t.p. Ĉar unu letero ofte enhavas informon pri pago de pli ol 20 kotizoj, pri enoficigo de kelkaj delegitoj, pri 4-5 adresŝanĝoj, tiu laboro estas sufiĉe prema, kaj speciale en la periodo Novembro ĝis Marto. Poste ni pretigas la mendojn, nun sufiĉe oftajn kaj sufiĉe grandajn, normale ni forsendas meze 100 ĝis 150 librojn ĉiutage.

Tiam nia stenografistino devas aŭskulti mian voĉon dum unu ĝis du horoj, ĉar mi diktas la respondojn al leteroj. Al la granda plimulto ni respondas en la tago de ricevo, kvankam tre longaj leteroj ofte devas atendi ĝis tago en kiu estas malpli da urĝa laboro.

Sekvas la enskribo de la kaslibro kaj poŝto. Tion mi kutime prenas en la aŭto, ĉar tre ofte la pezo de la taga poŝto estas inter 25 kaj 50 kilogramoj! Post la reveno, tralego kaj subskribo de leteroj, estas intertempo por lunĉo.

Posttagmeze pli da diktado, aranĝo de mendoj por libroj aŭ gazetoj, pretigo de mia parto de la gazeto, aŭ, en la nuna sezono, de la venonta Jarlibro (kaj tio okupas centojn da horoj tre malfacile troveblajn).

Jen mallonga priskribo de la normala rutino, sed en ĉiu semajno okazas io kio kaŭzas ŝanĝojn kaj ofte malfacilaĵojn. Ekzemple, antaŭ kelkaj tagoj ni devis multobligi tri 12-pagajn dokumentojn por la UNESKO-konferenco, afero kiu okupis ĉiun liberan momenton de du personoj dum kvar tagoj, precipe ĉar la dokumentoj estis en diversaj naciaj lingvoj. En la nuna semajno ni pretigas la banderolojn por „Esperanto”—dutaĝa laboro.

Verdire por nia malgranda oficistaro estas tro da laboro, sed aferoj iom post iom pli-

boniĝas. La membraro regule kreskas kaj ni havas bonan esperon, ke estonte ni ne nur evitos deficitajn financajn sed eĉ povos doni pli grandan kaj pli interesan gazeton al la legantoj. Tio malgraŭ la fakto ke en tre multaj landoj ni ne povas akcepti membrojn pro la neebleco ricevi pagojn, kaj en aliaj landoj membreco eĉ ne estas permesata. Se ĉiu, kiu volus aliĝi al UEA povus tion fari, estus neniam dubo ke ni nun havus minimume dekdu mil individuajn membrojn kaj povus eldoni la gazeton kun 64 paĝoj ĉiumonate. Ke tiu tempo baldaŭ alvenu estas la sincera deziro de

CECIL C. GOLDSMITH.”

Verdlando Vokas

Listo de radiodissendoj en aŭ pri Esperanto. Tempindiko: M.E.T. (= mezeŭropa tempo) valida ankaŭ en Belgujo, Nederlando kaj Svisujo. Mallongigoj: I = informoj. P = paroladeto. K = kurso. M = muziko.

LUNDE:

13.30—14.00 La Coruna (Hispanujo), 250 m.: P kaj K.
23.10—23.20 Vieno I, 25,46 m., 48,74 m., 513 m.: I.

MARDE:

12.55—13.00 Berno, 31,46 m., 48,66 m., 75,28 m.: P de d-ro Arthur Baur.
15.30—15.45 Montevideo (Urugvajo), 280 m.: P (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
15.50—16.00 Ljubljana (Jugoslavujo), 327 m., 211,4 m.: K.
18.35—18.40 Berno, ondlongoj kaj P kiel 12.55.
23.30—24.00 Valencio, 200 m.: P.

MERKREDE:

16.30—16.40 Vieno II, 25 m., 30 m., 41 m., 48 m., 203 m.: P. (Nur ĉiudu-semajne).
17.00—17.10 Caramulo (Portugalujo), 206 m.: P de Alfred Sales.
18.50—19.10 Romo: 31,35 m., 49,92 m.: P. de Luigi Minnaja.
20.30—20.45 Barcelono (Katalunujo), 360 m.: I kaj K.
23.15—23.20 Hilversum II, 298 m., 188 m., V.A.R.A.: I.
23.15—23.20 Hilversum I, 402 m., N.C.R.V.: P kaj M (nur 27/X/1954).

ĴAŬDE:

08.30—08.35 Rijssel (Lille), 218 m.: P kaj K de prof. Labit.
09.30—09.45 Parizo, 348 m.: K. de Pierre Delaire.
12.55—13.00 Berno, 31,46 m., 48,66 m., 75,28 m.: P. de prof. d-ro Edmond Privat: „Esperanto-ideologio”.
18.35—18.40 Berno, ondlongoj, kaj P kiel 12.55.
23.50—24.10 Zagreb (Jugoslavujo), 264,7 m.: P.

VENDREDE:

18.50—19.10 Romo, 31,35 m., 49,92 m.: P de prof. d-ro V. Musella.
22.30—22.45 Gvatemalo, 30,50 m., 47 m., 197 m., 470 m.: I.

SABATE:

09.30—10.00 Rio de Janeiro, 30,71 m., 375 m.: K. kaj I.
23.15—23.20 Hilversumo I, 402 m., K.R.O.: I.

Informoj kaj petoj:

Radio Roma. - Jen detaloj pri programoj en okt. '54: 1/X: Personaj impresoj pri mia vojaĝo al kaj tra Nederlando. 6/X: Instruistoj kaj lernantoj en la antikva Pompei. 8/X: Rideto abundas . . . sur la lipoj de saĝuloj (2-a premio pri originala prozo en la 15-a hispana kongreso en Saragoza. 13/X: Riveroj, lagoj kaj plaĝoj de Italujo. 15/X: „La sinjorino kun la lampo”: Florence Nightingale; okaze de la unua jarcentfesto de la Ruĝa Kruco (1854-1954). 20/X: Vagante tra la stratoj de Romo. 22/X: „Esperanta Ligilo”, universala gazeto por la geblinduloj de la tuta mondo okaze de ĝia 50-a datreveno (1904-1954). 27/X: Marguerite Sautreuil kantas. 29/X: Leterkesto kaj bibliografio. Sendu skribajn aplaŭdojn al Radio Roma, Esperanto-fako, Casella postale 320, ROMA (Italujo).

Informojn pri Esperanto-radio-dissendoj sendu ne nur la radiostacioj, sed ankaŭ la radio-geaŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, TJKERWERD (Fr.), Nederlando.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:
 Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.
 Penningm.: P. M. Mabeoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.
 Boekendienst: S. Mabeoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postrek. 76915.
 Schr. cursus voor gevorderden: H. Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.
 Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
 Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
 Alg. Ned. Esp. Examen-comm. Mej H. M. Mulder, Zilvermewstr. 29 Badhoevedorp
 Cefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.
 Vic-efed. F. Weeke, Zwolseweg 172 A, Diepenveen. Postrek. 22075.

Komunikoj de la ĉefestraro**BAZA KAPITALO POR LA UNIV. KONGRESO EN HAARLEM.**

Ni komunikas al la malavaraĵ subtenantoj de la baza kapitalo, ke la okazinta Univ. Kongreso en Haarlem donis profiton kaj ke ni sekve ne bezonos uzi la nomitan garantian kapitalon.

La kasisto de L.E.E.N. pretas repagi la sumojn, kondiĉe ke oni resendu al li la akcio(j)n kaj indiku la manieron, laŭ kiu la sumo devos esti redonata.

Se ne venos respondo de donacinto antaŭ la fino de ĉi tiu jaro, ni komprenos ke oni deziras ke la ĉefestraro uzu la sumojn por estontaj propagandaj celoj.

Sincere ni dankas al ĉiuj, kiuj kunlaboris kaj sekve kontribuis al la sukceso de la 39a Univ. Kongreso.

EKSIGO DE LA KASISTO:

S-ro P. M. Mabeoone sciigas ke li definitive demetos ĉiujn sciajn funkciojn en nia asocio je la 31a de decembro proksima. Por ke lia anstataŭont(in)o jam povu spertigi, ni petas niajn sekciojn tuj nomi kandidatojn por la vaktanta funkcio ke kasisto.

KOTIZO DUA DUONJARO:

Afable ni petas la sekciajn gekasistojn tuj giri la ŝuldatajn sumojn en poŝtkonto no. 34563 de nia asocio. Oni bonvolu aldoni la kontribuojn de la donacantoj.

KONGRESLIBRO:

Ĉiuj sekcioj ricevis ekzempleron de la 180-paĝa kongreslibro de la 39a U.E.A.-kongreso en Haarlem por siaj arkivoj aŭ bibliotekoj.

ESPERANTO OP DE KWEEKSCHOLEN:

Naar wij vernemen is de heer H. Groenendijk, leraar in de Nederlandse taal aan de Rijksskweekschool te Arnhem er in geslaagd met medewerking van de directeur van de school de heer J. Lukkes een Esperanto-cursus aan genoemde school te vormen. Voor zover ons bekend, is dit de eerste Esperanto-cursus die krachtens de nieuwe kweekschoolwet aan een kweekschool wordt gegeven en wij wensen de heren Lukkes en Groenendijk van harte geluk met dit succes.

Tradukkonkurso

En la jarkunveno de L.E.E.N. en Amersfoort ni aŭdis de diversaj flankoj, ke oni tre ŝatas niajn tradukkonkursojn. Tial ni volas komence de la nova laborsezono okazigi konkurson por la grupoj por ke oni povu laborigi la grupojn en la klubvesperoj. Jen la reguloj.

1. Por ĉiu membro de la grupo, kiu partoprenas en la konkurso, la kasisto sendu al ni gld 0,25 per nia poŝtkonto No 22075.

2. Post ricevo de la mono ni sendos la taskon al la sendinto de la mono.

3. En la grupvesperoj oni rajtas uzi ĉiujn vortarojn, lernolibrojn kiujn oni volas kaj povas laŭplaĉe interkonsiligi pri la solvo de la eventualaj problemoj.

4. Kiam la traduko estas preta la sendinto de la mono sendu unu ekzempleron por la tuta grupo da partoprenantoj al ni, aldonante sur aparta papero sian nomon kaj adreson, sed sur la tasko men aperu nenia nomo aŭ alia indiko.

5. Post ricevo de la taskoj ni sendos ilin al la kontrolanto.

6. La taskoj faritaj devas atingi nin antaŭ la 15a de decembro 1954.

7. Post depreno de la mono por la taskoj por la preparo de la taskoj kaj afranko la restanta sumo estos dividata por la premioj kiuj konsistos en libroj aĉetebblaj ĉe la libroservo de L.E.E.N.

Karaj gemembroj, ju pli granda la nombro da partoprenantoj des pli granda estos la nombro da premioj. Do ni esperas, ke ĉiuj anoj de ĉiuj grupoj partoprenos, ĉar laŭ ĉi tiu aranĝo ankaŭ komencantoj povos partopreni lernante per la diskutado de la pli kleraj. Ek al la laboro!!

La gvidanto
F. Weeke

Kontribuo al la

Aliloke en ĉi tiu gazeto la leganto trovas raporton pri la 39a Universala Kongreso de Esperanto en Haarlem. Por kompletigi ĉi tiun raporton ni represas ĉi tie ankoraŭ la kontribuon, kiun faris nia ŝatata svisa samideano, profesoro Edmond Privat, al la kongreso per du paroladoj, kiuj apartenis al la plej altnivelaj partoj de la tuta aranĝo: la mallonga salutparolado dum la inaŭguro kaj la prelego en la Internacia somera universitato pri Okcidenta kaj Orienta Kulturoj. Dum la solena malfermo profesoro Privat diris:

„En Nederlando loĝas popolo racie modesta kaj ne fanfaronema pri si mem, sed ege kuraĝa. De centjaroj ĝi batalas kontraŭ la oceano por vivi. Antaŭ centjaroj ĝia parlamento proklamis ke „Dio ne kreis popolojn kiel sklavojn de princoj” kaj fama gvidanto proklamis ke „Ne necesas esperi por entrepreni”.

„La esperantistoj ĉiujare renkontigas en grandaj kongresoj, inter la plej grandaj kiuj kunvenas en la mondo, sed ili konscias, ke tamen ilia movado ankoraŭ reprezentas nur etan proporcion de la homaro kaj devas pene barakti por ricevi oficialan helpon. Eĉ ekzistas eble iom da ĵaluzo kontraŭ kongresoj sen tradukistoj kaj montrantaj la ĝojon de unueco internacia kaj facila interkompreno.”

„En unu sola glano kuŝas en potenco tuta arbaro, skribis Emerson kaj certe la esperanto-kongresoj estas edukejoj de la estonta unuigonta homaro. Estas

Gazetar-Servo Nederlando

Kvankam estas multaj kialoj por plendi ni direktu la okulon al tiuj samideanoj kiuj age montras la bonvolon lukti favore al movado kara al ni.

Kore ni dankas niajn helpantojn pro la sendado de gazetoj. Tiamaniere oni instigas unu la alian al pli streĉa aktiveco.

Post la grandega sukceso de la U.E.A. kongreso, ĉiu nun volas partopreni kaj esti aktiva, kaj mi rapidas peti vian atendon por la „G.S.”; sendu do ĉiujn gazetojn kiuj enhavas ion pri Esperanto, sed ne forgesu, ni bezonas gazetnomon kaj daton.

Gazetar-Servo L.E.E.N., Ges-anoj Oosthoek, Bree 49a, Rotterdam (Z).

Kongreso de Haarlem

bone ke la semo jetita de Zamenhof havis la tempon kreski malrapide kiel juna kverko, ĉar la lingvo povis fariĝi vivanta. Ĝi nun enkorpiĝas la homaran senton, kiu ankoraŭ mankas al oficialaj mond-institucioj. En la stratoj de Haarlem la verda standardo estas ne teoria simbolo, sed signo de vivanta spirito, kiun bezonas la mondo por realigi sian unuecon en diverseco kaj sian kunvivadon en respekto de la malsamaj gepatraj lingvoj kaj kutimoj. Ju pli riĉiĝos la enhavo de Esperanto, des pli ĝi allogos la dezirantojn de homara kulturo."

La ĉefaj pensoj de la prelego, de profesoro Privat en la Somera Universitato estis jenaj :

„La plej lastaj renkontoj inter Okcidento kaj Oriento okazis sur batalkampoj. Nur feliĉe la milito ĉesis kaj oni rajtas memori pri la renkontoj sur la kultura kampo. Dum la greko-romana kaj la hebrea-kristana kulturoj disvastiĝis en Eŭropo, la Hinda Vedanta kaj Buddista kulturoj disvastiĝis en Azio kaj aldoniĝis al la ĉina Konfucia kaj Taoista saĝo. Islamo disvastiĝis inter la okcidenta kaj Orienta mondoj. La intelekta renkonto inter Okcidento kaj Oriento tre malfruis kaj la interkompreno eĉ pli. En la modernoj tempoj la poeto Tagore fondis monduiversitaton en Shantiniketan por akceli tiun komprenon. Tie la aziaj studentoj ŝatas studi ĝuste tiujn okcidentajn aŭtorojn kies penso similas al la oriento. Carlyle, Emerson, Walt Whitman spertis kosman konscion. Ili kredis je universala kaj eterna spirito sub la diversaj vestaĵoj de la kreado. En la angla lingvo ili disvastiĝis ideojn, kiuj helpas interkomprenon. En la franca lingvo tion faris Romain Rolland per siaj verkoj pri Ramakriŝna kaj Vivekananda.

Ĉar la Oriento nun akiris kreskantan influon en la tutmonda vivo, la universalista penso kaj klopodo de homararoj kiel Tagore fariĝas ne nur utila, sed necesa elemento en nia nuna mondo, kiu bezonas toleremon kaj pli profundan konscion pri sia unueco."

Ĉi tiu seka resumo tamen nur tre malkomplete respegulas la riĉecon de ideoj kaj la brilon de la oratora artverkaĵo, kiuj entuziasmigis la multnombrian ĉeestantaron.

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 100, Mechelen

Prezidanto : Gerard Debrouwere, Magdalenastraat 29, Kortrijk.
Sekretario: Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, St.-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).
Kasistino : F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.
Biblioteko : E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)
U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.
Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Raghenoplaats 9, Mechelen (tel. 136.77)
Korespondanta kurso: A. Nysstraat 37, Anderlecht



1955 V.E.B. - Jubeljaar

Alhoewel wij voor de maand Oktober geen nieuw initiatief nemen, doch op een reeds in het vorig jaar toegepast premiestelsel terugkomen, daar het zich als efficient heeft geopenbaard, moeten wij toch onderlijnen dat wij ter gelegenheid van het jubeljaar een buitengewone financiële krachtspanning hebben gedaan (een extra-schietgebed voor onze Kasistino a.u.b.) zodat wij, ook dank zij een ruime steun van het V.E.I., de hiernavolgende, met zorg samengestelde lijst kunnen publiceren:

HELSINKI, Setälä, foto-album,
 prachtig uitgewerkt waarde 130 F.
 KVAROPO, gedichtenbundel,
 recent, waarde 70 F.
 TIPOJ KAJ ASPEKTOJ DE
 BRAZILIO, waarde 90 F.
 SALTEGO TRANS JARMILOJ, de
 Forge, waarde 40 F.

Wie zal nu uit de lijst hiervoor mogen kiezen? Het zijn die inwonende leden die onder het toezicht van het bestuur zullen uitgeloot worden onder al diegenen van dezelfde ledenkategorie die uiterlijk op 28 Februari 1955 hun bijdrage gestort hebben. De vier aldus aangeduide leden mogen dan in de volgorde van hun naamafroeping hun keuze doen.

Mogen wij er nog eens op drukken dat een inwonend lid gratis de drie maandelijks afleveringen van „De Esperantist“ ontvangt?

De werving van inwonende leden was in 1954 een succes: dank zij het

enthousiasme van het Jubeljaar 1955 bereiken wij nu wellicht een record.

Plaatselijk Nieuws

Alkmaar: Het adres van de Secresse Mevr. E. Dijkema-de Groot is met ingang van 1 Oct. : Westerweg 91.

Den Haag: La programo de la klub-vesperoj enhavas la jenajn punktojn. 7/10. F.ino J. B. Lehnen parolos pri...? ? ? ?

14/10. F.ino S. Biesma parolos pri ter-interŝango.

21/10. S.ro A. J. Nijdam rakontos pri okazaĵoj en la vilaĝo Jorwerd dum la tiea restado.

28/10. F.ino H. Metman rakontos pri sia vojaĝo al kaj restado en Venecio.

Antwerpen: Kun konsterno ni eksciis ke nia tre kara amiko kaj samideano H. Vermuyten estis la viktimo de relative grava trafik-akcidento.

Komence mi nur ricevis la komunikon ke li suferis plurajn ostorompojn.

Nun la finrezulto ŝajnas „nur“ rompo de du ripoj kaj malpli gravaj diversaj kontuzoj, tiel ke li estas jam resaniĝanta kaj libertempanta.

Al li niajn plej korajn dezirojn de rapida kompleta resaniĝo kaj plej baldaŭa reveno en nian medion!

La Beneluxa Esperanto-Kongreso en 1955-a

Dum pentekosto, je 28-30 de majo 1955-a okazos la jubilea kongreso en Utrecht. La malfermo okazos la 28-an de majo kaj post tio ni havos festan vesperon kaj balon. Dimanĉon estos Diservoj, kunvenoj, festmanĝo kaj arta vespero. London ni ekskursos aŭtobuse. En la venonta numero vi legos detalojn kaj la L.K.K. verŝajne pretigos la aliĝilojn.

La L.K.K. ne atendas ĝis multaj gesamideanoj aliĝis, sed jam luis ĝufice grandajn salonojn.

En Utrecht ni kunvenos.
 Ceeston poste benos
 La esperantistaro,
 Veninta en granda oro

LA GIMNAZIO

de : *Salom Aleĥem*
el la hebrea : *d-ro L. L. Zamenhof*

La plej malbona malamiko, mi diras al vi, ne faros al vi tion, kion homo povas fari mem al si, precipe se en la aferon enmiksiĝas virino, t. e. edzino. Pri kio, vi pensas, mi tion diras? nu, ĝuste pri mi mem. Jen, prenu ekzemple min: kiel vi min vidas, ŝajnas al vi, ke vi vidas nenion eksterordinaran; simpla hebrea, de meza klaso; Sur mia nazo ne estas skribite, ĉu mi havas monon, ĉu mi ne havas monon, ĉu mi eble sidas en ŝuldoj. Povas esti, ke iam mi efektive havis monon, kaj ne sole monon — mono nenion valoras — mi havis laborenspezojn, kaj mi havis ilin en honoro kaj kviete, mi ne flugis, mi ne bruis, kiel aliaj, kiuj amas „hi, hu ha” ... Ne, mia principo estas, ke kviete kaj nerapide estas pli bone. Kviete kaj nerapide mi butikis, kviete kaj nerapide mi kelkajn fojojn haltis, kviete kaj nerapide faris interarangon kun la komercistoj kaj kviete kaj nerapide denove komencis labori. Sed en la mondo ekzistas ja Dio; nu, Li favore donacis al mi edzinon... Ŝi ne estas ja ĉi tie, sekve ni povas paroli malkaŝe... edzino, por tiel diri, kiel ĉiuj edzinoj; Mi devas diri, ke laŭ la aspekto ŝi eĉ estas tute tolerebla, jes, tuta „persono”, Dio ŝin konservu, double pli granda ol mi, kaj ne malbela, eĉ belulino, oni povas diri, kaj ne malsaĝa, eĉ saĝa, oni povas diri, tre saĝa, multescia, tute viro. Sed ĝuste ĉi tio estas la tuta malbono! Ho, mi diras al vi, ne bone estas, se la edzino estas viro! Kiel ajn saĝa ŝi estas, sed la Plejpotenca ja tamen kreis antaŭe Adamon kaj nur poste Evon! Sed iru, parolu kun ŝi, ŝi respondas: „ke la Plejpotenca kreis antaŭe vin kaj poste nin, tio” ŝi diras, „estas Lia afero; sed pri tio”, ŝi diras, „ke Li donis al mi en la piedplatan pli da saĝo, ol vi havas en la kapo, pri tio”, ŝi diras, „mi ne estas kulpa”. — „Kiakaŭze”, mi diras, „vi nun parolas pri tio”? — „Tiakaŭze”, ŝi diras, „mi nun parolas pri tio, ke pri ĉio devas zorgi nur mia kapo; eĉ pri la enmeto de nia infano en la gimnazion”, ŝi diras, „ankaŭ devas pensi nur mi”. — „Kie”, mi diras, „estas skribite „gimnazio”? Ĉu ne sufiĉos por mi, se li ellernos la sciencon hejme?” — „Mi jam diris al vi mil fojojn”, ŝi diras, „ke vi neniam atingos mian konsenton, ke mi iru kontraŭ la moroj de la mondo; la moroj de la mondo postulas”, ŝi diras, „ke infanoj nuntempe vizitadu gimnazion.” — „Laŭ mia cerbo”, mi diras, „mi opinias, ke la mondo estas freneza.” — „Nur vi sola”, ŝi diras, „havas normalan prudenton! se la mondo” ŝi diras, „agus laŭ via prudento, ĝi efektive ĉele aspektus!” — „Ĉiu homo”, mi diras, „agas laŭ sia prudento.” — „Miaj malamikoj”, ŝi diras, „kaj la malamikoj de miaj amikoj

posedu tion en siaj poŝoj, en siaj kestoj kaj ŝrankoj, kion vi posedas en via kapo.” — „Ve estas”, mi diras, „al la viro, se virino kuraĝas lin kritiki.” — „Ve estas”, ŝi diras, „al la virino, se ŝi havas tian edzon, ke virino devas lin kritiki!” Nu, iru, diskutu kun virino! Kiam vi diras al ŝi unu aferon, ŝi respondas al vi ion tute alian; kiam vi diras al ŝi unu vorton, ŝi redonas al vi dek-du; kaj se vi decidis silenti, tiam ŝi subite komencas plori aŭ tute improvizite, pardonu mian esprimon, ŝi svenas. Nu, tiam vi estas jam vere enviinda!... Unuvorte, disputo post disputo, venkis fine ŝi, ne mi; ĉar ni ne faru al ni iluziojn: se „ŝi” volas, ĉu oni povas tiam ion kontraŭfari?... Unuvorte, kion mi rakontu al vi? Estis decidite „gimnazio”! Oni devas, ŝi diras, komenci preparadi la knabon, ke li eniru en la „komencon de ĉiu saĝo”, en la „mladŝe prigotovitelne” 1). Certe ĝi estas granda scienco! bagatelo, la „mladŝe prigotovitelne”! Mi pensas, ke ĉe ni la plej senkapbla ĥede-

ra 2) bubo, la unua renkontita komen-canto, povus ilin ĉiujn kaŝi en la poŝo, des pli ankoraŭ tia knabo kiel mia, pri kiu mi povas diri al vi, ke se vi traveturos tutan imperion, vi ne trovos duan similan! Mi estas ja patro, kaj mi ne devas laŭdi, sed mi povas diri al vi, ke li havas kapon, kian vi ne trovos en la tuta mondo. Kion mi longe rakontu al vi? Li iris, kaj li stariĝis al la ekzameno, kaj li ekzameniĝis, kaj ... ne sukcesis. Kiakaŭze? li ricevis „du” 3) el aritmetiko! Li estas, ili diras, malforta en la kalkulado, en la scienco de „matematiko”, ili diras. Kiel plaĉas al vi tia historio? La knabo havas kapon, kian vi ne trovos en la tuta mondo, eĉ se vi traveturos tutan imperion, kaj ili rakontas al mi histori-ojn pri ia matematiko! Unuvorte, li malsukcesis en la ekzameno. Kompreneble, tio min tre forte ĉagrenis: Se li iris jam ekzameniĝi, mi dezirus almenaŭ, ke li sukcesu! (daŭrigota)

- 1) Mladŝij prigotovitelnij klass (ruse): komenca prepara klaso.
- 2) Ĥedero: hebree lernejo (religia) por malgrandaj knaboj.
- 3) La noto „du” ĉe la ekzameno signifas „malbone”.

Grava Renkontiĝo en Verviers

Dimanĉon la 5-an de septembro okazis en Verviers renkontiĝo de esperantistoj apartenantaj al 3 apudaj landoj: Nederlando, Germanujo kaj Belgujo. En la salono de Muzikkonservatorio, la gvidantoj de la loka grupo, t. e. S-ro Héron, prezidanto, s-ro Kairis, vicprezidanto, s-ro Lenzen, sekretario, s-ro Demarche, kasisto, s-ino Héron, s-ino Mention, s-ro Koeune, administranto de R.B.L.E., akceptis siajn geinvitojn, proksimume 80 personojn.

Je la 10 h. 30, s-ro Héron, prezidanto, malfermis la kunsidon. Li bonvenigis la ĉeestantojn, inter kiuj troviĝas: s-ro Paul Firmennich, estro de la Esp. Ligo de Okcidenta Germanujo; s-ro Plum, estro de la katolika movado de Nederlanda Limburgo; s-ro Soyeur, vicprezidanto de Reĝa Belga Ligo Esperantista; s-ro Sterken, el Maestricht eldonanto de „Nia Organo”; s-ro Siffirin, germana delegito; s-ro R. De Kegel, el Charleroi; s-roj Desonay kaj Guyot, membroj de L.K.K. de la lasta Beneluksa Kongreso, k.t.p.

S-ro Héron legis leteron, kiun li ricevis de Prof. Edm. Privat. Poste li atentigis pri la granda laboro farita de la Centro de Esploro kaj Dokumentado kaj de ties prezidanto, Prof. Lapenna. Li rememorigis ke la venonta kunsido de UNESKO, de kiu ni atendas multon, okazos dum oktobro en Montevideo.

Li transdonis tiam la paroladon al s-ino Siffirin, germanino, kiu legis raporton pri sia vojaĝo al Italujo kaj poste al la Univer-

sala Kongreso en Haarlem.

Post kantado de la himno „La Espero” (ĉe la fortepiano, s-ino Koeune, blindulino), la esperantistoj iris kune al la urbdomo, kie atendis ilin la urbestro, s-ro Adrien Houquet, ĉirkaŭita de s-roj Lentz, skabeno, Vandermeulen, senatano, Boland, Lemarchand, Lonneux kaj Pleyers, konsilantoj kaj f-ino Mathieu, oficistino.

La urbestro bonvenigis la ĉeestantaron kaj rememorigis la vivon de la grupo de Verviers de post ĝia fondiĝo en 1908. Lia parolado estis tradukata de s-ro Kairis. Poste dankis pro la honoro al ili farita, s-roj Héron, Plum kaj Firmennich, nome de siaj respektivaj landoj. — Honora vino kaj fotografado fermis la kunsidon.

Posttagmeze okazis vizito al la fabrikejo „INTERVAPEUR”, societo por la donado de vaporo al la ĉirkaŭantaj uzinoj kaj ankaŭ al la privatuloj por la hejtado de la domoj. Tre interesa vizito, dum kiu 2 inĝenieroj donis al la aŭskultantoj multajn informojn pri la produktado de la vaporo.

Ni revenis tiam al la sidejo de la Verviers'a grupo kaj daŭrigis la babiladon. S-ro De Kegel arte deklamis „La Vojo” n kaj tre klare komentis la verkon, laŭ la ritmo, laŭ la akcento.

Antaŭ ol fermi la kunsidon, s-ro Héron aplaŭdigis s-ron Koeune, kiu tute sola, aranĝis ĉiujn manifestaciojn de la tago kaj faris ĉiujn klopodojn por la sukceso de tiu renkontiĝo.

J. S.

LA STUDANTO

Jen la ĝustaj participoj de

Ekzerco 18 A:

Estimata Korespondanto,

1: okazonta (= kiu okazos); alproksimiĝanta. 2: situanta (= kiu situas); vizitata (= kiun oni vizitas; ne: vizitita = kiun oni vizitis, ĉar oni ankoraŭ ofte vizitas la lokon.). 3: logata. 4: Partoprenanta (= dum mi partoprenos; „ante” esprimas la samtempecon, kiun en subpropozicio esprimas la konjunkcio „dum”); lernitan (= kiun mi lernis; ankaŭ: lernatan = kiun mi ankoraŭ lernas). 5: parolata; skribata. 6: parolata, skribata (ne: -ota, ĉar la estontecon esprimas la helpverbo; la participa sufikso esprimas la stadion de la ago, kiu ĉi tie ankoraŭ daŭros en la estonteco, do: -at-). 7: korespondanta; parolanta (ne: onta! Vidu la interkrampan rimarkigon ĉe frazo 6-a). 8: trovintaj (en la estonteco, esprimita de la helpverbo, la ago estos finita, do -intaj); babilantaj (ago ne jam finita); Esperanto. 9: komencantino; ekzercenta, lernitajn; komprenigante (= dum mi komprenigos min. Vidu la rim. ĉe frazo 4-a!). 10: salutata; sopiranta, ekscitita; antaŭĝojanta, kongresonta korespondantino.

Jen la ĝustaj verbaj finaĵoj de

Ekzerco 17 B:

1: skribis; partoprenos (ne-rekta parolo!). 2: esperas; ĉeestos (ne: ĉeestu! Post la verbo „esper” sekvas indikativo!). 3: Estos; vidos. 4: deziris ankaŭ: deziras; prokrastu (post „deziri” sekvas la volitivo). 5: farus; vidus (kondicionalo: ne plenumita kondiĉo!). 6: partoprenos; vidos (ne kondicionalo, ĉar la kondiĉo povos esti plenumata). 7: demandas (ankaŭ: demandis); trovos (ne-rekta parolo). 8: sendis; donas. 9: Estos, havu. 10: pluvos; legu; brilos; tenu; rekonos; salutas; deziras. (La punkto post „dezir—” estis prese-raro.)

NOVAJ EKZERCOJ

Ekzerco 19 A:

Donu ĉapelon al la literoj, kiuj bezonas tian decan kapkovrilon:

Satata Amiko,

1: La 39-a Universala Kongreso tre placis al mi. 2: Cu ankau al vi? Tre

certe, ke jes. 3: Kiel ciam mi bone ricevis vian satatan leteron. 4: Bedaurindaĵo estas, ke mi en Harlemono sense sercis, sed ne trovis vin. 5: Minutoj, horoj kaj tagoj pasis kaj ce ĉiu paso iu demandis: „Cu vi perdis ion?” 6: Mi serce respondis, ke mi perdis nion, ec ne la kuragon, sed ke mi sercis iun. 7: Mi staris en nico kaj legis la gazeton, dum pluvus. 8: Kiam cesis la pluvo kaj ekbrilis la suno, mi sovis inter la sunon kaj mian kapon la pluvombreton. 9: Mia gorgo raukigis kaj mi ektusis, sed via mano ne ektusis la mian. 10: La rendevua giceto saĝne ne funkciis por mi, sed eble la posto havigos rekuragitan leteron vian al nesanceligante via VERDULINJO

Ekzerco 18 B:

Kie estas streketo, tien metu la ĝustan personan, posedan aŭ refleksivan pronomon (li(n), lia(j)(n), si(n), sia(j)(n)):

Estimata fraŭlino Verdolino,
1: Via korespondanto s-ro Kongresemulo petis min skribi al — geamikoj.
2: Vi estas unu el — geamikoj, kiuj atendis — en la 39-a U.K. 3: Li havis akcidenton kun — aŭtomobilo kaj vundis — dekstrajn brakojn kaj kruon.
4: Li permesis al — tro forte ĉirkaŭbraki arbon kaj nun li povas direkti nek — aŭton, nek — skribilon. 5: — plumo en mia mano nun surpaperigas — pensojn. 6: Ne povante mem skribi al — amikino, li tamen deziras al ŝi bonan kongreson, kiu nun ne plezurigas —. 7: En — imago li jam vidas — kongresamikinon tenanta — pluvombreton super —. 8: Bedaŭrante — ne partoprenon, li deziras al — gesamideanoj agrablan kuneston. 9: El — malŝanuleja lito li sendas — koran saluton. 10: Ĉi tiun — leteron skribis por — flegistino.

Ekzercojn korektotajn gelegantoj sendu al la kompilinto de la rubriko: S. S. de Jong Dzn., Waltaweg 3, TIERKWERD (Frislando), Nederlando

VINTROTEMPO — LIBROTEMPO

Satata donaco por viaj korespondantoj kaj ankaŭ por vi mem estas unu el la sekvantaj libroj:

	gl.	b.fr.
Vivo de Zamenhof	bind. 3.25	40.—
Inter Sudo kaj Nordo (Szilagy)	” 5.75	85.—
La Alaska Stafeto (Omelka)	” 3.25	40.—
Morto de Trajno (Crofts)	” 5.30	70.—
La Lanternisto (Sienkiewicz)	” 2.90	40.—
Peer Gynt (Ibsen)	” 8.—	90.—
Anstataŭa Edzino (Maxwell)	” 3.—	40.—
Jugoslavio kaj ĝiaj Popoloj	” 7.90	105.—
Biografio de Tito (trad. M. Stuttard)	” 11.—	145.—
Kredu min Sinjorino (Rosetti)	” 5.40	72.—
Bagatelaro (Rosbach)	broŝ. 4.—	55.—
Haarlem, kun multaj fotoj	” 1.—	—
Rakontoj pri Nederlando kun fotoj	” 1.75	25.—
Premiaj Rakontetoj	” 0.60	—
Arboj de la Arbaro	” 0.60	15.—
Pli ol Fantazio (Bogh Högsted)	” 1.70	22.50
Ĉe la Sanktaj Akvoj (de Heer)	bind. 6.60	75.—
La Teatra Korbo (Baghy)	1.50	20.—
Victoria (Hamsun)	1.40	22.—
<i>Por la studemuloj:</i>		
Tra la Labirinto de la gramatiko	5.90	85.—
Post la Kurso (de Bruin)	2.—	30.—
De Voorzetsels in Esperanto	2.50	26.—
Esperanto in 20 lessen	3.—	40.—
Honderd vragen over gramatica en onderwijs	0.35	5.—
Plena Vortaro	11.40	150.—
Suplemento al Plena Vortaro	3.—	42.50
Vortoj kaj Esprimoj	1.15	15.50
Meulenhoff's Vortaro	3.95	60.—
<i>Sekcioj atentu! Speciala oferto:</i>		
Lana Esperanto-flago 75-120 cm.	11,—	—

Mendu ĉe:

Libro Servo LEEN., Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O.
Flandra Esperanto Instituto, Blankenbergse Steenweg 72, Brugge.

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris post n-roj 173/174: s-ro M. Monnaers, el St.-Pieters Leeuw, por V.E.B., kaj por L.E.E.N.: s-ro A. Lodema el Amsterdam.

SOLVOJ

175. Nacio; kresto; banko; leono; kulpo; torako; marko; lampo; valso; slipo; takelo; limako; merito; areno; forto; tineo; libro; migri; metio; ruti-no; droni; groto; barako; vakso; breto; kateno; krespo; plori; ribelo; latuno; rasti; opinio; loterio; faldi; atako; karto. De atendo kaj espero pereis multaj sur tero.

176. *Hor.*: korne, kresp, orl, stagn, estri, piedfingr, do, ol, malpermes, agi, ekran, titol, ne, vermo, re.

Vert.: skism, hen, pom, ke, ornami, apr, ebl, av, leonid, pane, fleg, eklezi, ritm, nom, io certig, est, ros, or, optik, ale.

177. INTERMIKSU

la literojn de ĉiu donita vortparo, aldonante plian literon por trovi novan vorton, respondantan al la klarigo. La aldonitaj literoj, sinsekve legataj, formas proverbon.

Vortparoj: trovu/bele; pri/veŝto; lami/preme; reĝa/teo; ano/rasti; tria/verbo; ridi/pento; preta/ripo; kano/tramo; netolgrave; muta/pilko; semi/klano; trans figo; kirli/koto; nul/kolekti; karto/nuko; paŝtilorno; sed/ponto; mendo/rana; pleboltemi; kanti/domo; kampodati; garbo/kota; bildo/nuno; ruli/cigno; mala/bapto; peti/kasto; tikli/volo; puni/lenso; muta/beko.

Klarigoj: 1. ĝi havas spinon; 2. vojaĝo sur maro; 3. ne konsenti, ke iu faru ion; 4. domparto; 5. malsanulejo; 6. malnova meblo ofte estas tia; 7. li iras sur trotuaro; 8. kunhelpi; 9. tabelo de mangajoj; 10. li ne manĝas vian-don; 11. ĝi anstataŭas katon; 12. nei; 13. ege rapide skribi; 14. oni bezonas ĝin antaŭ ol verŝi vinon el botelo; 15. virino penanta plaĉi per vestoj kaj manieroj; 16. rivalo; 17. oni uzas ĝin por pintigi krajonon; 18. mastro; 19. eksploda metala globo; 20. tagoj en kiuj oni ne estas devigata labori; 21. iu aktoro; 22. malfeliĉa; 23. iu ŝipo; 24. ŝi havas helan hararon; 25. belaspekta virino; 26. batalejo; 27. li vendas ĥemiaĵojn; 28. oni dormas sub ĝi; 29. li loĝas kaj manĝas en malgranda hotelo; 30. ĝi ellasas fumon.

178. KRUCVORTENIGMO.

Horizontale: 2. flueca; organo de fiŝo(R). 3. metala stango(R). 4. malnova armilo; esti la ĉefo. 5. konjunkcio; arbo(R); daŭre(R). 6. kovrita per haroj(R); ne ellasi(R). 7. zorgi pri hejma ekonomio(R). 8. stulte rigardi(R); havi inklinon. 9. korpa organo(R). 10. malsano; havanta multajn bukletojn(R).

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
2	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
3	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
4	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
5	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
6	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
7	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
8	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
9	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
10	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
11	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■

Vertikale: 1. kurbigi(R); fermi per metalhoketo(R). 2. plialtigi(R). 3. malmilda; forte sin ĵeti antaŭen. 4. forpuŝi polvon(R). 5. arkitektura stilo(R); stimulo(R). 6. granda, laŭ metafora senco(R). 7. eventualeco(R); grundi. 8. esti lokita(R). 9. estanta post ĉiuj aliaj(R); pensiita(R). 10. saltanta besto(R). 11. difekti per kombino kun oksigeno(R); neklarvida.

Solvojn sendu la nederlandanoj al s-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstraat, 21 hs., Amsterdam-Z.; la membroj de F.L.E. aŭ de R.B.L.E. al s-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, antaŭ la 20/X/1954.

Oni rakontas . . .

...Ke okaze de bankedo organizita okaze de la 80 jaroj de Somerset Maugham, oni demandis al ĉi tiu ĉu li preferas la literaturajn agadojn ol la mangojn en la mondumo. — Estas malfacile diri tion, li respondis, ĉar tiaj estas la diferencoj inter ambaŭ. Efektive, en la mondumaj tagmangoj, oni ĝenerale manĝas tre bone, sed malmulte kaj oni multe parolas por diri malmultan bonon. Male, en la literaturaj mangoj, oni ĝenerale manĝas malbone sed multe kaj oni malmulte parolas por diri multan malbonon.

Anoncetoj

J. Harmens, Kuracejo „Beatrix” AP-PELSCHA (Fr.) Nederland. Jam dum jaroj malsana; volas plejeble korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, il. poŝtkartojn ktp.

José Martínez C/Magallanes No 15 Pr 2a BARCELONA (P.S.) Hispanujo. Volas nepre trovi korespondant(in)on en nederlando.

Bibliografio

KAJ TAMEN DIO ESTAS AMO de D-ro F. W. A. Korff; el la Nederlanda de W. Versteeg, Graftdijk; eld. S. V. Voorhoeve - Den Haag - 1954 - p. 29 - prezo: fl. 1,— Recenzota.

DU MALSANOJ EN ESPERANTO de H. A. de Hoog; (Kia-ismo; Tiom-Kiom-ismo) eld. E. Carlen, Hallabrottet (Svedl.) 1954 - p. 140 - Recenzota.

ADAMO KAJ EVA, dramo en Tri Aktoj de Fr. Azorin eld. Editorial Stylo, Meksikio. 1954 - p. 16 - Recenzota.

PILGRIMEJOJ de la ĉefdiecezo Salzburg, Aŭstrio kore invitas vin al vizito! - eld. „Estonteco” Salzburg, en kunlaboro kun Hugo Steiner de IEMW, Wien - 1954 - p. 8. Recenzota.

HIMNARO ESPERANTA: Kompilita de Montagu C. Butler - 4-a eldono de „Fellowship of British Christian Esperantists.”

Havebla ĉe B.E.A. 140 Holland Park Avenue — London WB. 11. Prezo: 3 Angl. ŝil. 1954 - p. 161. Recenzota.

IVAN VI de Geraldo Mattos, Eldono de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro 1953; 144 p. Broŝ. 17.50 steloj, bind. 25 steloj.

Tiu ĉi kvinakta historia teatraĵo estas atentinda kontribuajo al la originala Esperanto-literaturo. Ĝi meritis esti prezentata sur la scenejoj; eĉ diletantoj povus fari tion.

La tragedio temas pri la malfeliĉa Ivan VI-a, kruele enkarcerigita dum sia tuta mallonga vivo (1740—1764) pro la ambicio de du virinoj: Elizabeto kaj Katarino la Granda. Kiam grupo de konspirantoj provis liberigi lin, li estis laŭ carina ordono, murdita de ia provosoj.

La teatraĵo ne estas perfekta, sed multepromesa verko de juna brazila poeto. Li scias esprimi riĉajn pensojn kaj sentojn en simpla, preskaŭ klasika lingvo. La verso estas kvinpieda jambo, plej ofte kun ekstra silabo; tiamaniere la verkisto evitas eliziojn. Du sinsekvaj versoj ĉiam rimas en tre feliĉa maniero. Amantoj de poezio aĉetu kaj laŭtleĝu tiun ĉi libron.

La presado estas zorge kaj klare farita; mi ne rimarkis preserarojn. Malplaĉa estas nur la kruda multekolora titolbildo.

J. H.

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-bond Postbus 100 — Mechelen en Ned. Esperantisten-Vereniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. - Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned).